


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFDIJK
(N.H.) NEDERLANDO
ĜIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
O, ALIAJ LANDOJ:
11 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15 V.FR.

F.1875241

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj

HISTORIO PRI LA TOMPSON-FARMO.

Dum la rakontado aliiĝas antaŭ la okuloj de la aŭskultantoj la tuta pejzaĝo, kaj ili vidas la regionon tia, kia ĝi estis antaŭ proksimume 130 jaroj.

Tiam ne estis ebenaj kampoj kun ridantaj montoĉenoj en la fono, sed nur arbaro, arbaro. Serpentoj sin volvas ĉirkaŭ arbotrunkoj, sciuroj grimpas sur branĉoj, inter la arbustoj aŭdiĝas io: sin-garde montras sin la nazo de iu vulpo. Sperta ĉasisto tuj rimarkus, ke en la proksimeco troviĝas cervoj. Sed en tiu ĉi tempo — ĉirkaŭ la jaro 1770 — ankoraŭ neniu blankulo trapenetris ĉi tien.

Kion? Ĉu eksonas laŭtaj voĉoj? Ĉu aŭdiĝas fortaj hakilfrapoj tra la arbaro? Kiu faras al si vojon tra la sovaĝejo? Estas tuta kolonio, konsistanta el geviroj kaj infanoj, kaj ĉiuj streĉe laboras. Ili forhakas arbojn kaj sur la neokupita loko ili segas la trunkojn kaj branĉojn en tabulojn. La plimulto el tiuj homoj estas juna. La plej aĝa el ili: kruda, fortmuskola viro, kun sovaĝa eksterajo kaj longa barbo, estas supozeble proksimume kvardekjara. Evidente li ordonas al la malgranda aro, ĉar la viroj ĉiufoje aliras lin por konsiliĝi kaj pli ol unufoje lia voĉo sonas laŭte kaj ordone. Tompson estas lia nomo kaj li venis kun la samsortuloj el Germanio ĉi tien por provi la fortunon.

Nun ili provas kontentigi la unuan bezonon — precipe rilate al la virinoj kaj infanoj — nome: loĝejon. Multajn noktojn ili, la viroj, pasigis sub la nuda ĉielo kaj tio ne malutilis al ili. Sed al la virinoj kaj infanoj ne estas tiel facile — ili bezonas tegmenton super la kapo. Grandajn postulojn oni ne havas kaj la multo da manoj faciligas la laboron.

Ĉirkaŭ sunsubiro la unua domo estas preta. La fumo devas

eliĝi tra truoj en la tegmento, kaj ĉi lasta ne bone retenas la pluvon. Tra la pordo devas enveni lumo kaj freŝa aero, kaj en la muroj estas fendoj kaj aliaj malfermaĵoj, kiujn la infanoj klopodas ŝtopi per musko kaj arboŝelo. Sed ĝi estas ilia propra domo kaj pli valore: ili mem konstruis ĝin.

„Vivu la domo de Tompson!” krias forta viro kaj la aliaj kun-krias: „Hura! Hura! Hura!” La birdoj kaj sciuroj, jam dormantaj, timigite vekigigas. Vidante la lumbrilon de la granda fajro, kiun la koloniistoj faris por rosti la ĉasaĵon, iuj el la birdoj ekpensas, ke la taglumo jam venis kaj mallaŭte ili ekpepas.

Post kelkaj monatoj staras je ioma distanco ankoraŭ tri aliaj lignodomoj. Sed la loĝejo de Tompson estas kaj restas la plej bela, la plej granda. Tiu ĉi domo ekhavas unua kelkajn plibonigojn. Dum longa tempo sola ĝi estas ekstere gudrita kaj havas du grandajn fenestrojn kun vitrokaheloj: unu rigardas al la sudo, unu al la oriento.

La infanoj iras nudpiede kaj en maldelikataj roboj kaj kiteloj. La knabinoj helpas la patrinon; ili purigas la domon, kudras, trikas kaj hakas brullignon. En sia libera tempo ili fiŝkaptas aŭ zorgas pri la flor- kaj legomĝardeno malantaŭ la domo. Larĝeŝultraj ili estas, kun manoj malmolaj kaj ruĝaj pro la kruda laboro; ilia haŭto estas brunigita de la suno.

La viroj kaj la knaboj faligas arbon post arbo. Post du jaroj da neinterrompita laborado kaj daŭra zorgo ili konfidas la unuajn grenerojn al la tero.

La etaj, verdaj plantetoj multope elkreskas. Tiam venas la vintro, tre, tre severa en tiuj ĉi regionoj. Ĉu la malgrandaj kreskaĵoj restos vivantaj? Eĉ apud la fajro kaj sub pezaj litkovriloj la homoj ne sukcesas varmigi sin. Kiom multe da zorgoj patrino Tompson donas al sia plej juna infano, kiel ajn ŝi dorlotas kaj flegas ĝin tage kaj nokte, tamen nun kiam la vintro venas, ĝi forvelkas kiel neĝo degelas sub la suno. Neĝo! Ho ve, kiam la unuaj blankaj flokoj falas, patro Tompson fosas en la malmola tero malantaŭ la farmo la unuan tombon. Sed tiu neĝo kovras per varma, dika vesto la malgrandan grenkampon. Kaj kiom ajn malfacile la homoj travivas la vintromonatojn, kiom ajn ili devas batali kontraŭ malvarmo, malsano, mankoj, la etaj plantetoj kuŝas bone ŝirmataj.

Fine venas la somero, kaj la greneroj maturiĝas en la spikoj: — ho jes, kia Danktago post tiu unua rikolto! Post la hejmenveturigo de la lasta garbo patro Tompson nudigas la kapon kaj

preĝas tremvoĉe „Nia Patro”. Kaj ĉiuj laŭte diras la „Amen”.

Pasis kvindek jaroj. Eble vi pensas, ke ankoraŭ la malnova farmisto staras tie. Tamen ne estas li — patro Tompson, lia edzino kaj multaj aliaj kuŝas jam longan tempon apud la malgranda tombo, kiun li mem fosis por sia filineto, kaj la plej aĝa filo transprenis la gvidadon super la farmo. Multo aliĝis. La nombro da loĝejoj pligrandiĝis kaj ne nur la farmo de Tompson povas fieri pri iom da komforto. Granda parto de la arbaro estas forhakita, kaj la sufiĉe grandaj grenkampoj, ĉirkaŭ ĉiu farmo, estas ĉirkaŭbaritaj per palisoj, ĉar ofte okazis, ke leporoj aŭ kunikloj difektis la grenon. La nuna farmisto konstruigis apud la loĝdomo ankoraŭ alian ejon, en kiu li havas siajn tri belajn ĉevalojn, kaj ankaŭ kiel magazeno por la ilaro ĝi servas. Bone la farmistoj vivas ĉi tie, precipe de kiam ili ekkomercis kun la loĝantaro de la nova urbo P. en la valo. De la farmo de Tompson al P. eĉ vojo estas farita, laŭ kiu oni transportas la lignon, prilaborotan en la urbo.

Dum somero oni povas laŭiri la vojon en unu horo kaj duonan. Printempe, aŭtune kaj vintre estas neniu trafiko ebla sur tiu vojo. Aŭ la neĝo venas ĝis la kolo, aŭ la koto ĝis la genuoj.

Nun estas frusomero. Belega vetero: ne tro varme en la suno, ne tro freŝe en la ombro de l'arbaro. La plenaĝuloj ĝoje laboradas, la infanoj deziras iri eksteren. Tamen ne sonadas nun hakil- aŭ martelfrapoj, kaj patrino Tompson, staranta en la pordo kun la mano super la okuloj, plenzorge atentas, ke siaj du geetuloj, Mari kaj Amos, ne iru eksteren.

Terura sciigo atingis ilin: laŭdire Indianoj estas en la proksimeco. Kiam ŝia plej aĝa filo Dik hieraŭvespere hejmvenis kun tiu novaĵo, patrino Tompson paliĝis. „Ho Dio!” ŝi diris, kaj ŝi premis la malgrandan knabinon sur sia sino tiom firme en la brakoj, kvazaŭ jam tuja danĝero minacis.

Tiun nokton la farmisto kaj la grandaj filoj maldormis laŭvice ĉe granda fajro, kaj armitaj de la kapo ĝis la piedoj. Tra la arboj ili povis vidi la fajrolumon de Roberts kaj Petersen, kiujn Dik ankoraŭ avertis.

En la mateno ili selis la tri ĉevalojn kaj forrajdis kun kelkaj aliaj farmistoj por fari esplor-ekskurson. „Ĉu eble vi deziras, ke unu el ni restu hejme, Ellen?” demandis patro Tompson antaŭ ol foriri. Sed lia edzino respondis kun kuraĝa rideto: „Ho ne. Dumtage, kio do povus okazi al ni? Se vi nur revenu, antaŭ ol mal lumiĝos.”

Trege trankvila ŝi tamen ne estas. Tion pruvas la ŝargita pafilo, kiu staras preta! Jus ŝi metis la orelon sur la teron kaj kredis aŭdi piedfrapadon de ĉevaloj. Tial ŝi staras nun ekstere kaj jen, ili tri revenas. La ĉevaloj estas ŝvit- kaj polvokovritaj, kaj la mienoj de l'viroj montras seriozecon. „Nu?” demandas patrino Tompson senspire.

„Estas vere,” diras ŝia edzo. Petersen trovis piedsignojn en la arbaro, sur la farmo de Buk mankas kaprino kaj- kaj- nu, vi do sciu: de farmisto Jansen la bruna ĉevalo estas forprenita. Li sendis sian knabon kun la novaĵo al P., sed tie oni ne kredas, ke nin minacas danĝero. „En la lastaj cent jaroj ne montris sin India- noj ĉi tie,” ili diras. „Krome estus tro impertinente, se ili riskus montri sin tuj apud la urbo. Vi maltrankviliĝas pro nenio. Tiu ĉevalo certe retroviĝos, aŭ ĝi akcidentiĝis.” Tiel ili lasas nin sen helpo!”

„Sed eble ili pravas!”

„Ho ne! Kaj la piedsignoj do? Petersen konjektas, ke ili estas ie ĉe la grandaj rokoj, kaj ke ili estas multope.”

„Do, ni eklaboru!” Patrino Tompson jam prenis firman decidon,

Ok pafilojn ili posedas. Ok truojn ili hakas en la muro, sufiĉe grandaj por enmeti la pafiltubojn. Kartoĉojn ili serĉas, armilojn akriĝas. La virinoj plenigas ĉiujn sitelojn kaj vazojn per akvo. La palisaron ili plifortigas —, unuvorte, la tuta farmo de Tompson estas nun en stato de defendo.

Dum tiu semajno tamen nenio eksterordinara okazas, kaj la atentemo jam malfortiĝas. Dumnokte oni ne plu severe gardas, la infanoj kuŝas ne plu vestitaj en la lito kaj ili denove riskas eniri la arbaron. Nenie io suspektinda.

Dimanĉmatene sinjorino Tompson rajdas kun la plej aĝa filino al P. por tie ĉeesti la diservon. Ambaŭ virinoj havas infanon antaŭ si sur la ĉevalo.

En tiu nokto okazis la perfida atako. Dum la patrino kaj la filino trankvile dormis en P. kaj ankaŭ la koloniistoj profunde dormis, ŝteliris bruna viro singarde al la fajro kaj mortigis per unu hakilfrapo la viron, kiu enpense rigardis la flamojn. Preskaŭ senbrue la malfeliĉulo glitis teren. Sed ne tiom mallauĝte, ke lia kamarado, kuŝanta sur la tero, ne aŭdis ion, kaj tiu vekigis el sia duondormo kaj levis sin kun sufokita krio. Du manoj tuj premis lian kolon: krii por helpo ne eblis. La venkinto fajfis akre kaj tuj estis en la arbaro svarmado de duonnudaj figuroj.

Dume la aliaj farmistoj vekigis kaj la brilo de rapide lumigitaj torĉoj vidigis scenon de plej granda konfuzo. La viroj kuris eksteren, infanoj ploris, la hundoj tiris freneze siajn ĉenojn kaj laŭte bojis. Kaj dum la viroj kuregis al la palisoj, la virinoj sin ŝirmis en la domoj.

Jam iu indiano riskis transgrimpi la barilon, sed tuj oni mortpafis lin. Ekstere sekvis sovaĝa kriegado. Dekstre, maldekstre, antaŭe, poste, ĉie aperis pli kaj pli da brunaj vizaĝoj,, kaj ĉiu vizaĝo montris diablan ridaĉon.

La kolonio estis ĉirkaŭita, kaj por la loĝantoj ne ekzistis eliro. Sep belaj lignodomoj forbrulis en tiu nokto. Kadavroj de viroj, virinoj kaj infanoj, karbiĝintaj kaj nerekoneble difektitaj, kuŝis dise, kelkaj eĉ profunde en la arbaro. Nur unu knabo, kiu la postan matenon venis sur ĉevalo al P., savis sian vivon.

„Ili certe enfermis nin,” estis la sola, kion diris Pat Buk. „Ili surprizis nin, sen ke iu havis tempon por defendo. Ilia tendaro estas ĉe la grandaj rokoj: la fajrojn mi vidis.”

Frue en la sekvonta mateno la viroj el P. iris kun Pat Buk al la grandaj rokoj, sed la friponoj estis jam for. La cindro de iliaj fajroj ankoraŭ estis varma, multe da ujoj kuŝis dise sur la tero. Dum semajnoj kaj monatoj patroloj rondiris la arbarojn en la ĉirkaŭaĵo — pri la indianoj tamen neniu postsigno.

Patrino Tompson, kiu en unu nokto griziĝis pro ĉagreno pri la perdo de siaj edzo, infanoj kaj hejmo, restis en P. kaj ŝi prenis Pat Buk en sia domo. Ĉiuj homoj kompatis sin kaj pro tio ŝi ricevis kun sia filino baldaŭ sufiĉe da kudro- kaj gladolaboro. Sed ŝi sopiris al la libera vivo sur la farmo. Kiam la fileto rimarkis, ke la patrino estas malĝoja, li ekstaris antaŭ ŝi, dirante: „Estas nenio, panjo. Kiam mi estos viro, mi denove konstruos la Tompson-farmon; pli bela ĝi estos ol iam antaŭe. Kaj tiam ni travivos ankoraŭ feliĉajn tagojn.”

Li plenumis sian promeson, kaj sinjorino Tompson trovis ankoraŭ ĝojplenajn tagojn. Preskaŭ sur la sama loko, kie staris la malnova farmo, sin levis post dudek jaroj nova konstruo.


La juna farmisto pentris per belaj, nigraj literoj la nomon: „Tompson-farmo” super la pordo, kaj lia maljuna patrino kun eta blonda Amos sur la genuoj rigardis tion ridete.

Ankaŭ ĉi tiu infano grandiĝis kaj li heredis la farmon de sia patro. Kaj jen, vidu, kio fariĝis en 50 jaroj el la Tompson-farmo.”

El: „Miesje” de Cl. Bauer.

trad.: VANE

ENIGMOJ




a, a, a, e, e, e, e, g, l, l, l, l, m,
m, n, n, n, n, o, o, o, o, r, r, r, r, t.
La vortoj signifas, horizontale kaj
vertikale:

1. Lumigilon; 2. kortbirdon.

Gjelekovec (Jugosl.)

ANDROLIC

LA SOLVOJ EL NO. 10-11.



Premion gajnis: S.ro V. Gruscinskij, Nikolaev (Sovetio); S.ro Ŝoiĉi Takego, Aiĉikan (Jap); S.ro M. Milverger, Warszawa (Pol.).

Premion pro verkaĵo gajnis: S.ro Androlić, Gjelekovec, (Jugosl); S.ro M. Milverger, Warszawa (Pol.).

La solvo de la rusa enigmo en „LJV” No. 10-11 estis jena: La kondamnito elektis unu papereton kaj tuj disŝiris ĝin. Ĉar sur la alia papero staris la vorto „morto” oni liberigis lin, opiniante, ke li disŝiris la papereton kun „vivo”.

LUDO (Ĉasado en gazeto).

Ĉiuj ludantoj havas antaŭ si saman numeron de Esperanto-gazeto (ekz. „La Juna Vivo”). La gvidanto nomas iun urbon, personon, libron aŭ ion ajn, troviĝantan en la gazeto. La ludanto, kiu unue trovis la nomitan vorton, ricevas unu poenton. Kiu fine havas la plej multajn poentojn estu honorata en iu amuza maniero. Ekz: la prezidanto faras paroladeton pri la „kuraĝa ĉasisto”. Tiu ĉi respondas, rakontante el siaj aventuroj. Ankaŭ alia ĉasisto povas tiam fanfaroni.

Buinen (Ned).

M. MEDEMA.

19. DU GEREĜIDOJ. *)

Moderata ritmo.

e b̄ ā e e G D

1:G 6 | 6 3 4 3 . 2 | 1 . . 1 . 1 2 |

Vi - va - dis du ge - reĝ - i - doj, a -

G a Ġ C e G D G D e C

3 3 2 1 5 6 | 1 1 2 | 3 3 2 1 5 6 |

mantoj de kelka jar', Kun - ve - ni ne - ni - am

G e a ā⁷ D e

1 . . 1 . 6 | 3 3 2 1 1 7 | 6 ||

po - vis, Ĉar i - lin dis - i - gis la mar'.

„Karulo, se vi povus naĝi,
Alnaĝi dumnokte al mi,
Bruligos mi tri kandelojn
Montrontajn la vojon al vi.”

Dormantŝajna monaĥino
Envie aŭskultis ĝin;
Vespere estingis trompe
Kandelojn de l' reĝidin'.
Dumnokte fordronis la princo
Fiŝiston nun serĉis knabin'.
En barko fiŝkaptis tiu,
Ĝis kiam retrovis ja lin.

Ensaltis de l'alta bordo
En maron la reĝidin'.
„Ĝepatroj, karegaj miaj,
Neniam plu vi vidos min.”
Eksonis la mortsonoriloj
Malgaje tra tute la land',
Kuniĝis la reĝidino
En morto kun sia amant'.

Trad. JUUL KARNAS.

(flandra popolkanto el la mezepoko).

*) El: Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.
Prezo: 0,35 gld. aŭ tri respondkup.

Por komencantoj

ANEKDOTO.

Sinjoro iris sur longa, polva vojo. Li aspektis tre lace, oni povis vidi, ke li jam longe marŝis. Flanke de la vojo sidis fiŝkaptisto. La sinjoro turnis sin al li kaj demandis: „Kiom da tempo mi ankoraŭ bezonos por atingi la urbon?”

La fiŝkaptisto tute silentis. La sinjoro pli laŭte ripetis: „Kiom da tempo mi ankoraŭ bezonos por atingi la urbon?” — Ne venis respondo.

Nu, li certe estas surda, pensis la sinjoro kaj iris plue. Apenaŭ li faris 20 paŝojn, kiam la fiŝkaptisto kriis: „Post unu horo vi estos en la urbo”.

„Sed — Sed — kial vi ne respondis tuj?”

„Kompreneble mi ne povis. Antaŭe mi devis vidi kiom rapide vi marŝas!”

Kiu marŝis sur longa vojo? Kia estis la vojo? Kiel la sinjoro aspektis? Kion oni povis vidi? Kie sidis fiŝkaptisto? Al kiu la sinjoro turnis sin? Kion li demandis? Ĉu la fiŝkaptisto respondis? Kial la sinjoro ripetis la demandon? Ĉu venis respondo? Kion pensis la sinjoro? Kien li iris? Kion kriis la fiŝkaptisto? Kial li ne tuj respondis?

LA MALSANULO.

Iun tagon sinjoro vizitis faman kuraciston en Venecio, kaj diris: „Mi estas nervmalsana. Ĉu vi povas helpi min? Mi ĉiam havas kapdoloron kaj estas tre melankolia.”

„Ĉu eble via koro ne bone funkcias?”

„Mia koro estas tute sana.”

„Ĉu vi perdis karan amikon, aŭ parencon?”

„Ankaŭ ne.”

„Vi devas viziti fremdajn landojn, por distri vin.”

„Ho sinjoro kuracisto, mi jam estis en multaj landoj, sed ĉie mi enuis.

„Se estas tiel, mi scias ankoraŭ unu rimedon. Iru vespere al la koncertejo por aŭskulti la faman kantiston Veluti. Tio gajigos eĉ la plej melankolian homon!”

„Ho ve, tio certe ne eblas, ĉar..... mi estas Veluti.”

Kiu vizitis faman kuraciston? Kie la kuracisto loĝis? Ĉu la sinjoro estis malsana? Kion li diris? Ĉu lia koro estis malsana? Kion la kuracisto konsilis al li? Kial la paciento ne volis iri a fremdaj landoj? Kion la kuracisto fine konsilis al li? Kial la sinjoro ne povis aŭskulti la kantiston?

LA ĜUSTA HORO.

Petro iris al festo. Lia patrino diris: „Revenu antaŭ la unua horo!” — Petro promesis. Sed li estis plezurema. Kiam li revenis estis la kvara. Tamen li ne faris bruon, ĉar li ne volis veki sian patrinon. Sed subite falis seĝo kaj la patrino vekigis: Tuj ŝi demandis: „Kioma horo estas?”

Kaj Petro respondis: „Estas la unua!”

Sed — ho ve! Samtempe la kamen-horloĝo sonigis la kvaran! Kolere Petro diris al la horloĝo: „Oni tre bone scias, ke estas la unua! Estas senutile ripeti tion kvarfoje!!!”

BARONO DE MUNĤHAŬSEN RAKONTAS.

Mi ĉiam povis bonege salti, kaj ankaŭ mia ĉevalo. Neniam iu fosaĵo estis tro larĝa, neniuj barilo tro alta por ni.

Okazis foje, ke mi ĉasis leporon, kiu transkuris la vojon. Sammomente alvenis kaleŝo kun du riĉaj sinjorinoj. La veturilo iris ĝuste inter mi kaj la leporo. Mi instigis la ĉevalon kaj — jen ĝi ensaltis tra unu pordeto kaj elsaltis tra la alia, tiom rapide, ke preskaŭ mankis al mi la tempo levi la ĉapelon kaj respekte peti pardonon al la sinjorinoj pro la ektimo, kiun mi kaŭzis al ili.

Alian fojon mi vidis dum rajdado tra granda arbaro subite antaŭ mi marĉon kun kano kaj junko.

Mi ne volis fari ĉirkaŭvojon, tial mi spronis la ĉevalon por salto. Sed subite mi ekvidis, ke la marĉo estas pli granda ol mi supozis. Tial mi turnis la ĉevalon en la aero kaj resaltis sur la teron. La duan fojon mi faris pli longan alkuron, sed la salto estis ankoraŭ tro mallonga kaj ni falis ne malproksime de la bordo en la ŝliman marĉon. Mia ĉevalo henis kaj snufis pro timo, kaj pli kaj pli ĝi mallevigis en la koton, kaj certe ni estus perdintaj la vivon, se la forto de mia brako ne estus savinta nin. Kun plej granda sinregado mi prenis la voston de mia peruko kaj tiris min kaj la ĉevalon, kiun mi premis inter la genuoj, el la marĉo.

Respondu al jenaj demandoj: Kiu rakontas pri siaj aventuroj? Ĉu ankaŭ la ĉevalo bone povis salti? Kie kuris iam leporo? Kio alproksimiĝis? Kiu sidis en la kaleŝo? Kio okazis? Kion faris la ĉevalo? Ĉu barono de Munhhausen estis afabla viro? Laŭ kio tio montriĝas? Kie li spertis la duan aventuron? Kio kreskis en la marĉo? Kial li spronis la ĉevalon por salto? Kial li turnis la ĉevalon? Ĉu li turnis la ĉevalon sur la tero? Ĉu ili la duan fojon saltis trans la marĉon? Kio okazis? Ĉu la ĉevalo timis? Ĉu la barono timis? Kiel li tiris sin kaj la ĉevalon el la marĉo?



Esperanta rondo de gimnazianoj el ŝtata klasika gimnazio en Bygoszcz kun nia fervora kunlaboranto Profesoro Sygnarski.

LUDO.

Jen bela lertaĵo, kaj nome: kiel vi povas kalkuli ies aĝon kaj krome la monaton, en kiu li naskiĝis. Ekzemple vi diru al via amiko: „Pensu pri la monato, en kiu vi naskiĝis, kaj tiel, ke ne la nomo estu en via kapo, sed la nombro de tiu monato. Januaro ekzemple estas la 1a monato, do, en tiu okazo vi pensu pri la nombro 1; Junio estas la 6a monato, do, rilate ĝin vi pensu pri la nombro 6, ktp.” Sed li ne diru la nombron. Post tio vi diru: „Multipliku tiun nombron per 2. (Ankaŭ enpense).

„Kaj nun adiciu 5.”

„Multipliku la sumon per 50. Adiciu la nombron de via aĝo. Nun deprenu 365 kaj aldonu denove 115. Ĉu preta? Nun diru al mi la rezulton.”

Se ekzemple via amiko venis al la nombro 520, li naskiĝis en la 5a monato kaj havas 20 jarojn. Se li trovis la nombron 318, li naskiĝis en la 3a monato kaj havas 18 jarojn. Nun provu foje, ĉiam la rezulto estos ĝusta!

VANE.

LA ĈASO AL ORO.

En la sudo de Nord-Ameriko estas regiono, nomata Meksikio. La vojaĝantoj, kiuj jam antaŭ 400 jaroj revenis el tiuj regionoj, sciis mirigajn rakontojn pri riĉaj or-minoj. Tial la reĝo de Hispanio sendis grandan armeon por batali kontraŭ la meksikianoj kaj forrabi de ili la trezorojn.

Kiam la hispanaj soldatoj atingis la urbon Meksikon, kiu kuŝas en la mezo de granda ebenaĵo, ili staris mutaj pro ĝia grandiozeco kaj beleco.

Oro! oro! oro! Ĉie oro!

La kruelaj soldatoj ne estis kontentaj per tio, kion ili povis forrabi; ili atakis la meksikiajn nobelojn, mortigis milojn da ili kaj forŝtelis la juvelojn, kiujn ili portis.

Tiam sekvis granda batalo, kaj la meksikian reĝon ili malliberigis en la propra palaco.

Sed la loĝantaro de la venkita lando estis tiom kolera pro la kruelaĵoj de la hispanoj, ke ĝi ne volis submeti sin. Okazis batalo post batalo kaj la popolon oni persekutis kaj mortbatis kiel sovaĝan beston. Fine la meksikianoj sukcesis liberigi sian reĝon. Brave li batalis ĉe la fronto de l'armeo, sed tamen la hispanoj venkis.

La meksikianoj tiam forkuris kaj ili postlasis milojn el siaj bravuloj sur la batalkampo. La reĝa standardo el pura oro estis perdita kaj Meksiko estis prenata.

La hispanoj iris hejmen trans la maro kaj ili postlasis malgrandan armeon por estri la urbon.

La sekvintan someron kreskis sur la granda ebenaĵo ĉirkaŭ la ĉefurbo, kie okazis la terura batalo, sennombraj orkoloraj floroj.

„Mortfloroj” ilin nomis la meksikianoj, ĉar ili elĝermis el la tero, kiu estis saturita de la sango de multaj el iliaj kamaradoj.

Sed „oraj anserfloroj” nomis ilin la hispanoj, ĉar ili havis la koloron de l'metalo, pro kies posedo ili faris tiom multajn kruelaĵojn.

VANE.

Al la holandaj abonantoj, kies abono finiĝis je 1 Julio:

Al tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis la abonkotizon, ni afable petas: faru tion baldaŭ. Post **15 Julio** ni sendos kvitancojn! Pagante antaŭ tiu dato vi do ŝparos al ni multan laboron, kaj al vi mem la kvitanckoston! (Nia ĝironumero estas: 209354).



Grupeto da junaj anglaj Esperantistinoj, kiuj vizitos ĉismere la Esperanto-Domon en Arnhemo. La gvidantino de la grupeto estas F.ino Nixon, en Birmingham.

ELEKTADO DE JUĜISTO.

Petro la Kruela, reĝo de Kastilio en la 14a jarcento, estis malgraŭ sia malmolkoreco de tempo al tempo prudenta monarko. Li mem elektis la juĝistojn de sia regno kaj tre singarde li faris tion. Foje la ofico de juĝisto ĉe la plejsupra juĝejo en Seviljo vakis, kaj tri kandidatoj anoncis sin.

Petro invitis la tri virojn en sian palacon, montris al ili la duonon de oranĝo, kuŝantan sur la fundo de lavopelvo, kaj demandis al ili: „Kio ĝi estas?”

„Tio estas oranĝo,” respondis la unua sen hezito.

„Tio estas duono de oranĝo,” diris la dua kun sama rapido.

Ĉar la tria ne donis respondon, la reĝo ripetis sian demandon.

Post tio la tria kandidato klinis sin, metis la manon en la akvon, prenis la frukton, rigardis ĝin de ĉiuj flankoj dum kelkaj minutoj, kaj diris fine kun hezito: „Via reĝa Moŝto, mi opinias ĝin duona oranĝo.”

La reĝo metis la manon sur la ŝultron de tiu ĉi homo, dirante: „Vi estas la ĝusta homo kaj ricevos la oficon, ĉar kontraŭe al la du aliaj vi ne juĝis laŭ la ŝajno, sed de ĉiu flanko konsideris la demandon. Tion faru ĉiu, kiu aspiras al la respondeca tasko, kiu estas la juĝado de la agoj de niaj kunhomoj.”

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.

LA KALIFO DE BAGDAD.

Iu kalifo de Bagdad konstruigis por si novan palacon. Ĝi estis belega, ĉar la tegmenton subtenis centoj da alabastraj kolonoj, fontanoj plaŭdis en marmoraj basenoj, oro kaj arĝento abundis en la interno kaj la arto ornamis ĝin per grandvaloraj trezoroj.

Apud ĉi tiu bela palaco, tuj antaŭ la enirejo, staris malnova, kaduka kabano, en kiu laboris malriĉa teksisto. La maljunulo vivis tie sen ŝuldoj kaj sen turmentaj zorgoj. Kaj liaj tagoj pasis trankvile; neniun li enviis, neniun enviis lin.

Sed lia kabano staris tie tre maloportune. Kaj lia grandveziro diris: „Sinjoro, ordonu forigi tiun kabanon!”

Sed la kalifo diris pli milde: „Proponu al la malriĉa teksisto la kvin-, aŭ dekoblan valoron de lia kabano.”

La grandveziro devis obei kaj li proponis al la laboristo oron, laŭ la kvin-, dekobla valoro de l'kabano. Sed la grizulo trankvile respondis: „Ho, sinjoro, tenu viajn trezorojn, mi bezonas nenion kaj mian dometon mi volas konservi. En ĝi mi naskiĝis, mia patro en ĝi mortis kaj ankaŭ mi deziras morti en ĝi. Se la potenca kalifo volos tion, li povos forpeli min, kaj detruu mian dometon. Sed se li farus tion, mi venus ĉiutage forplori mian ĉagrenon sur tiu ĉi loko. Mi konas la kalifon; mi scias, ke li estas grandanima.”

Pro tiuj vortoj la grandveziro ekkoleris, sed li regis sin kaj reiris al sia mastro, al kiu li transdonis la vortojn de la teksisto.

Kaj la justa kalifo diris: „Mi ordonas, ke je niaj kostoj la kabano estu riparata. Ĝia ekzistado estos nia gloro. Niaj posteuloj vidos la palacon, kaj diros: „Li estis potenca!” Kaj ili vidos la kabanon kaj laŭdos: „Li estis justa!”

VIZITANTOJ DE LA VARSOVIA KONGRESO,

kiuj deziras aboni „La Juna Vivo” aŭ mendi la lernolibreton aŭ la kantaron, povas turni sin al nia peranto, S-ro J. Muusses. Li ankaŭ akceptos pagojn por la redakcio.

JARKOTIZO POR 1937/1938.

Argentino: **2 pes**; Aŭstrio: 3,20 ŝil; Belgujo: **14 fr**; Ĉeĥoslovakujo: 17 Kĉs; Ĉinujo **2 dol**; Danujo: **2,50 kr**; Estonio 2,50 kr; Finnlando: **25 finn.mark**; Francujo **12 fr**; Japanujo **2 jen**; Italujo **10 l**; Jugoslavio: **25 đin**; Norvegujo: **2,50 kr**; Polujo **3,20 zl**; Svedujo: **2,20 kr**; Svisujo: **2,10 fr**; Usono **0,60 dol**;

Ĉiu, kiu varbos 2 abonantojn je „La Juna Vivo” donace ricevos la novan kartaron „LJV”.



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol 2 linioj.

Anglujo: Angla instruisto kaj 3 komencantoj, biciklontaj Sept. 2—12 de Vlissingen ĉirkaŭ la IJsselmeer volas renkonti geesperantistojn en ĉiu urbo. Skribu al F. W. Armitage, Bryanstone School, Blandford, Anglujo.

Aŭstrio: Nigl Karl, lerneja servisto en Aigen 59, Mühlkreis, deziras korespondadi. Certe respondos.

Ĉeĥoslovakujo: S.ro L. Fabinyi, D. Liština 13, Silezio; p. Trinec, dez. kor.k. farmfilino Bets Oostwoud W., Abbekerk A 103 (NH).

Ĉeĥoslovakujo: 18 jara studento deziras korespondi kun gejunuloj. Vladimír Mohapl, 4, tr, Svanosti, Olomouc.

Ĉeĥoslovakujo: Interŝ. PM k.ĉ. landoj, 100 por 100 deziras: Jos. Vávra, lernejestro, Vlceřín 25, poŝta Ĉeesky dub. Certe respondos.

Ĉeĥoslovakujo: Ivan Dubravec, 15 jara, Košice, Cambelova 2, dez. kor. finnaj, svedaj, norvegaj fil. kaj lingvoŝatantoj.

Ĉeĥoslovakujo: Geskoltoj en la tuta mondo sendu al mi skoltaĵojn kaj sk. glumarkojn. F.ino J. Plhonová, Uh. Brod. Interŝ. PM. IP. Certe respondos.

Franco: S.ro A. Duburcq, 86 Rue de Marseille, Lyon (Rhône) deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

Nederlando: S.ro J. Plas, Middelie, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per leteroj kaj kartoj.

Nederlando: Kees Ooeloff, Tjerk Hiddestraat 5C, Leeuwarden, volas tre volonte korespondi kun geknaboj, precipe el Eŭropo. Aĝo 16 jaraj.

Nederlando: Marie E. Hoogendyk volas volonte korespondi kun gek. doj pri floroj kaj aliaj temoj. Spaarndammerdyk 89¹¹¹, Amsterdam.

Nederlando: Al ĉiu, kiu sendos al mi il. k. pri ventmuelejo de sia lando mi sendos samspecan de mia regiono. E. v. Walsum, Wyk E86, Alblasserdam.

Nederlando: S.ro P. H. Groen, 't Meer by Heerenveen 83, volas aĉeti Esperanto lego- kaj lernolibrojn.

Norvegujo: Birger Hegnes, Merak p.o. dez. kor. kun Esp.istoj en ĉ.l.

Polujo: 11 gejunuloj dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Tuja respondo garantiita. R. Wajntaŭb, ul. Grzybowska, 30 m 25, Warszawa.

Sovetio: Ukraino, Donbas, Postiŝevo, Novo-Ekonomičesky rudnik. Nova Kolonio 230—3. Nikolao, Podzis dez. kor., interŝ. pk. librojn, gaz. ktp.

Ĉeĥoslovakujo: Kiu al mi sendas 50 poŝtm. ricevos saman kvanton. Certa respondo F.ino A. Stefanková, Zeleznik, p. Revuca.

BONVOLU ATENTI!!!

De 25 Julio — 10 Aŭgusto la redakcio ferios.

Pro la ferio la venonta numero de „LJV” aperos 20 Aŭgusto.

ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

ANTAŬKONGRESO en PRAHA. Prepara komitato invitas la samideanojn viziti la 5-an kaj 6-an de aŭgusto la ĉefurbon. Rabato fervoja. Detalaj informoj ĉe la Prepara Komitato Fr. Slavik Praha XIX Uralské 9.

La Internacia lernejo „**KORNMOD**”, Silkeborg, Danujo aranĝas kursojn de de la 17a ĝis la 26a de Julio. — Internacia instruistaro, agrabla restado, la plej malalta prezo! Specialaj kursoj por infanoj kaj instruistoj. Petu programon.

Per „**LITERATURA MONDO**” vi ekkonos la plej famajn verkistojn esperantistajn! Jarabono 4,50 gld. Specimeno 0,20 gld. — En „**LINGVO-LIBRO**”, kvaronjara aldono al „LM” vi trovas la plej detalajn kaj objektivajn librokritikojn. Jarabono 0,40 gld. Tri ekz. kune sendataj 0,80 gld. Specimeno 0,10 gld. Ambaŭ revuoj estas mendeblaj ĉe „La Juna Vivo”.

ESP. KLUBO bezonas ĉiaspecajn ekspoziciaĵojn, afiŝojn, gazetojn, esp. reklamilojn, broŝurojn ktp. Sendu en granda nombro. Por la membroj ni serĉas daŭran korespondadon. Al ĉiu sendinto ni nepre respondos. Skribu al: J. S. Loof, Tholenstraat 11, Terneuzen, Nederlando.

„**ĈIELARKA STANDARDO**” estas la unua kaj sola internacia kooperativa gazeto esperantlingva. Jara abono 2,50 gld. Petu specimennon ĉe la Eldonkooperativo „Spółnota Pracy”, Warszawa, str. Marszalkowska 149/9, Polujo.

AFABLA PETO DE LA RED. Sendu ĉiajn esperantaĵojn (librojn, gazetojn) al fervora Esperantisto, kiu pro malsano jam dum pluraj jaroj kuŝas en la lito. Helpu lin! S.ro Rasink, 23 Leuvenstr. Leiden, Nederlando.

MEMOR-GLUMARKOJ (50-jara jubileo de Esperanto). Eldonis „Niaj Vizaĝoj”. Prezo: 0,15 gld. po 50 ekz. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”.

VIRINAJ KOLTUKOJ el silko, triangulaj, kun esperantaj simboloj (amo, paco, frateco). Prezo: 0,68 gld. Grandeco 80 × 80 × 120 cm. Menciuj koloron! Mendebla ĉe red. „LJV”.

ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ „Ni fosu nian sulkon”. 10 ekz. por 0,30 gld. Eld. „Verda Stelo” en Jugoslavio.

TAGE aranĝas karavanojn al Helsingör (Danujo) kie okazos la Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj. Gvidonto de la aŭtobusa karavano (al la kursserio 31.7 - 7.8), estos S.ro C. Jacobs, P. de Hooghstr. 24, Heemstede. Gvidontino de la vagonara karavano (al la Int. Esp. Semajno 7.8 - 14.8) estas F.ino A. Laverman, Molenpad 69, Leeuwarden.

REZULTO DE LA KONKURSO INTER FRUPAGINTOJ.

Jenaj personoj gajnis premion:

- S.ro A. Quarré, Drachten (Ned): La Aventuroj de Marteno Drake.
 S.ino de Bruin—Blessing, Schardam (Ned): La Trezoro de l'Oraĵisto.
 F.ino Oostwoud Wijdenes, Abbekerk (Ned): Fabeloj de Andersen.
 S.ro S. J. Knip, Andyk (Ned): Hamleto.
 S.ro J. P. Missel, Rotterdam (Ned): Lingvaj Respondoj.
 S.ro v. d. Kommer, Winkel (Ned): La Verbo en Esperanto.
 S.ino A. Derbeck, Brünn (Ĉehosl): Verama Raporto pri la German-Molsa Milito.
 S.ro J. S. Loof, Terneuzen (Ned): Mia poezio.
 S.ro S. Kuiper, Schagen (Ned): La Fundo de l'Mizero.
 S.ro D. Garms, Kwadyk (Ned): Imenlago.
 F.ino N. Blom, Santpoort (Ned): El la Nebulo.
 S.ro F. J. Krüger, Ter Apel (Ned): La Interrompita Kanto.
 S.ro H. v. Dam, Heiloo (Ned): Mimi Pinson.
 F.ino T. Moejes, Oudorp (Ned): Bindita jarkolekto „La Juna Vivo”.
 F.in N. de Wit, Beets (Ned): Bindita jarkolekto „La Juna Vivo”.
 Esp. Grupo en Thouars (Franc): Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.
 S.ro P. J. v. d. Heiden, Utrecht (Ned) Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.
 S.ro Nieuwenhuis, Egmond (Ned): Internacia Kantaro „La Juna Vivo”.
 F.ino M. Hoogendyk, A'dam (Ned): Internacia Lernolibreto „LJV”.
 S.ro P. Rol, Krommeniedyk (Ned): Internacia Lernolibreto „LJV”.

Esperantaj gazetoj, aboneblaj ĉe ni:

<i>Verda Revuo</i> , monata ... jara	f 1,50	<i>Literatura Mondo</i> , monata jara	f 4,50
<i>Nia Gazeto</i> , monata	„ f 1,35	<i>Niaj Vizaĝoj</i> , monata	„ f 0,65
<i>Scienca Gazeto</i> , dumonata „	f 1,50	<i>Esperanto-Internacia</i> , mon. „	f 2,50
<i>Heroldo de Esp.</i> , semajna „	f 6,80	<i>Bulteno de I.S.A.E.</i> , dumo-	
<i>The British Esp.</i> , monata „	f 1,20	nata,	„ f 1,35

Specimenoj. Ni sendas senpage specimenon de „La Juna Vivo”. Specimeno de *Literatura Mondo* kostas 20 cendojn. Ni ĝenerale havas ekzemplerojn de la aliaj kaj volonte sendas ekz. al iu ajn interesato kontraŭ 5-cenda poŝtmarko holanda aŭ egalvaloro.

<p>SKRIBA KURSO por A. kaj B. (nur por holandlingvanoj).</p> <p>Tre detala B-kurso. Gvidanto Simon Aarse.</p> <p>Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.</p> <p>La Verda Stelo, Radioweg 45, Amsterdam-O.</p>	<p>La ĉarma „verda” Danlando vokas vin al:</p> <p>„MARBORDA ESPERANTO-RESTADO INTERNACIA” en: Fuglso, Aarhus, de la 18a ĝis la 28a de Julio. Plena pensio: 13 gld.</p> <p>Ĉiaj informoj ĉe S.ro Harald Grönborg, Risskov, Danlando; S.ro August Weide, Hamburgo (Germ), kunlaboranto.</p>
---	--